

& Balado por Varsovia Vento:

< Rekante 15 el 25 batoj por strofo, entute 400 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid (2016).>

(#Melodio:

<:25> (

/SoSo SoFa MiSo do mi; rere remi redo Ti So;

(#Rekantaĵe: SoSo SoFa MiRe MiSo do; rere redo TiLa So; SoSo SoFa MiRe MiSo do
o)

)×)+

(&Strofoj:

'1 /Varsovia Vento sonas, ; rete ĝin la
mondo konas.

(×: **Varsovia Vento bla bla bla ;
donas bonan senton ja ; Varsovia
Vento bla bla bla.**)

'2 Irek en ĝardeno ĝuas ; gravan homon
intervjuas.

'3 Havas bonan mikrofonon, ; kostis ĝi
malmultan monon.

'4 Irek iras al kongresoj ; kaj plenumas
laŭ promesoj.

'5 Programerojn li redaktas ; kiuj
Esperanton traktas.

'6 Venas eksterlanda gasto ; rompas
kranon sen prokrasto.

'7 De radio redakto2r' ; al fremduj'
vojaĝas fo2r.

'8 Helpas Aguŝ intervjui ; kaj
malhelpas homojn brui.

'9 Ruĝa jam sufiĉe sperta ; intervjue
estas lerta.

'10 Varbas Marta sen riproĉo. ; Venkas
ŝia bela voĉo.

'11 Tomek familion pasis ; sed ne la
radion lasis.

'12 Du jam edziniĝis brile ; en Francujo
kaj Brazile.

'13 Kunlaboris tridek poloj ; pri
elsendoj kaj paroloj.

'14 Jam eĉ pli ol cent elsendoj ;
aŭskulteblas kvazaŭ bendoj.

'15 Pri esperantistoj famoj ; disvastiĝas
per programoj.

'16 Scioj al la tuta mondo ; venas per la
reta ondo.)